# *Fihav 2015: pli granda kaj amasa komerca foiro.*



La kuba ministro pri ekstera komerco kaj fremdaj investoj, Rodrigo Malmierca, anka? prezidanto de la organiza komitato de la 33-a Internacia Foiro de Havano, anoncis dum gazetara konferenco ke pli ol 70 landoj konfirmis sian partoprenon en tiu ?i internacia evento sesionta de la 2-a ?is la 7-a de novembro.

La ministro precizigis ke la ekspozicia areo estas pli granda ol tiu de la pasintjara foiro kaj anka? la uzo de la ekstera surfaco flanke de la eksponantoj,  superas la anta?an foiron.

Malmierca indikis ke ?irka? 900 kompanioj, el ili 570 eksterlandaj, partoprenos tiun ?i komercan borson, kiu ?iujare kreskas; li aldonis ke vizitos la foiron Fihav 2015 pli ol 30 altnivelaj delegitaroj gvidataj grandparte de ministroj kaj oni festos 15 naciajn festotagojn dum la foiro.

Inter la nova?oj li menciis la prezenton de la dua versio de la negoca dosiero kaj la adresaro de kubaj entreprenoj kiuj realigas eksteran komercon.

La? informis la organizantoj, Panamo estas la lando kun pli da kresko rilate al la pasintjara prezento, kaj sekvas Kanado kaj Venezuelo, kiu renovigis sian pavilonon kun tre alta nivelo kaj bona prezento de siaj produktoj.

Samkiel en pasintaj jaroj, Hispanio ratifas sian pozicion kiel lando kun pli da spaco okupata dum la foiro.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/72405-fihav-2015-pli-granda-kaj-amasa-komerca-foiro

Radio Habana Cuba